

Sendependa revuo en Esperanto

Tra la mondo

Lingvoj kaj politiko

Faka asocio

Unesko kaj Esperanto

El Esperanto-Urbo

Intervjuo

Vojaĝo per Esperanto

Movado

Pentristo

Alta teknologio



ISSN 2512-5060

N-ro 3 (3) Julio 2017

Tra la mondo

Sendependa trimonata revuo
fondita la 1-an de januaro 2017
en reta kaj papera formatoj A4(202×268)



ISSN 2512-5060

Kotizo

La reta versio estas senpage elŝutebla ĉe:
<http://tra-la-mondo.esperanto-urbo.de>
La paperan version ricevas nur pagantoj.
Mondonaco al la eldonejo estas bonvena.

Direktoro de la eldonejo

Peter Zilvar

Eldonejo de Tra la mondo

Interkultura Centro Herzberg
DE-37412 Herzberg/Harz,
Grubenhagenstr. 6. Germanio
Tel/Fakso: 0049/(0)5521-5983,
Poŝtelefono: 0049/(0)160-98754-190
<http://tra-la-mondo.esperanto-urbo.de>
esperanto-zentrum@web.de

Honora Ĉefredaktoro

Zsófia Kóródy



Ĉefredaktoro

Trezoro Huang Yinbao

Redaktejo

Esperanto-Centro Ora Ponto
Jingchuan-Xian Shijieyu Zhongxin
744300, Pingliang Gansu, Ĉinio
Tel: +86 (0) 933 3329289, +86 (0) 18893316800
trezoro@qq.com, agrikulturo@126.com

Kunlaborantoj de la aktuala numero

Ardo Hu Guopeng
Meng Yuli, Bruno Henry,
Gajo Li Chuanhua, Liu Minghui.

Kunlabora organizo

Esperanto-Muzeo Zaozhuang Ĉinio

Lingvoj kaj politiko

| | |
|---|----|
| Kial oni metu Esperanton je la servo de la mondo | 59 |
| Rusio eldonos ĉinlingvajn lernolibrojn por mezlernejoj | 60 |
| 82% ĉinaj voĉdonintoj apogas nuligi la anglan lingvon kiel devigan lernobjekton | 61 |
| Pensoj pri la taŭgaj instrumentoj de Esperanto por ĉinoj | 62 |
| Esperanto, lingvo ne facila por ĉinoj | 63 |
| Emociaj kialoj por uzi Esperanton | 64 |
| Speciala signifo de iuj kunmetitaj vortoj | 72 |

Faka asocio

| | |
|--|----|
| Internacia Scienca Asocio Esperanta (ISAE) | 65 |
|--|----|

Unesko kaj Esperanto

| | |
|--|----|
| <i>Unesko-Kuriero</i> aperos en Esperanto | 66 |
| UEA serĉas tradukistojn kaj provlegantojn por <i>Unesko-Kuriero</i> | 66 |
| Alvoko de Osmo Buller en 2000 | 67 |
| 36 volontuloj el 22 landoj kunlaboras-Teamo de la <i>Unesko-Kuriero</i> en Esperanto | 67 |

El Esperanto-Urbo Herzberg

| | |
|---|----|
| Omaĝe al Zamenhof: placo inaŭgurita en Herzberg | 68 |
| Grimprozujo 'D-ro Zamenhof' pompe floradas | 69 |

Intervjuo

| | |
|-------------------------------------|----|
| Intervjuo kun prof. Li Weilun | 70 |
|-------------------------------------|----|

Vojaĝo per Esperanto

| | |
|-------------------------------|----|
| Mia vojaĝo al Usono (2) | 71 |
|-------------------------------|----|

Movado

| | |
|---|----|
| Komenciĝas la E-kursoj en Pekina Lingva Universitato | 73 |
| Stafeto por mobilizi ĉinojn aliĝi al la 102-a UK | 74 |
| Tekunsido de Esperanto organizita de PEA | 75 |
| PEA kunvenis omaĝe al la centjariĝo de la forpaso de Zamenhof | 76 |
| Inaŭguriĝis Shandong-a Esperanto-Klubo en la Zaozhuang-a Universitato | 77 |
| Ekspozicio pri Zamenhof kaj pola kulturo okazos en Zaozhuang | 78 |
| XEA komencis kunlabori kun loka entrepreno | 79 |
| Festo de la 32-jara Tianjin-a Esperanto-Asocio | 79 |
| La 4-a Irana Esperanto-Kongreso en Tehrano | 80 |

Pentristo

| | |
|---|----|
| Pentristo Liu Derui kaj liaj pentraĵoj pri tempo kaj vivo | 81 |
|---|----|

Alta teknologio

| | |
|---|----|
| Akrilacia polimera akvimuna farbo LEAC por protekti akvan tralikon | 82 |
| La kompanio LEAC serĉas kunlaborantojn | 83 |
| Bildo sur la fronta kvorilo: D-ro Zamenhof-rozo en la Esperanto-urbo, Germanio. | |
| Bildo sur la dorsa kovrilo: Pentraĵoj de s-ro Liu Derui (Ĉinio). | |
| La emblemon de la revuo desegnis LA-Arts (Hungario). | |

Jen la tria numero, kiu laŭ niaj kalkuloj kaj espero atingos pli multajn legantojn, ol la antaŭaj. Ni ĝojas, ke la ĝis nun ricevataj reagoj estis tre pozitivaj, ĉar tio montras, ke la revuo realigadas sian celon kaj fariĝis ŝatata, kolora, multtema informilo pri eventoj kaj interesajoj el Ĉinio, el Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo en Germanio kaj ankaŭ el aliaj landoj, kontinentoj.

En la nuna numero inter aliaj ni raportas pri specialaj eventoj, memorfestoj okaze de la 100-a mortodatreveno de Zamenhof, kiun ankaŭ Unesko rekomendis festadi en la jaro 2017. Ni alvokas al kunlaborado por eldoni la *Unesko-Kurieron* en Esperanto kaj kompreneble ni alvokas por ricevi donacojn, financon subtenon por la daŭra eldono kaj senpaga elŝuteblo de tiu ĉi gazeto. Bonan legadon!

Zsófia Kóródy, Honora ĉefredaktoro de Tra la mondo



Esperanto ne estas nur lingvo, sed lingvo por plibonigi la mondon

Kial oni metu Esperanton je la servo de la mondo

■ *D-ro Renato Corsetti (Britio)*

Ĉiuj, kiuj konas la historion de Esperanto, scias, ke en Bulonjo-ĉemaro oni aprobis kompromisan deklaron pri esperantismo, laŭ kiu estas esperantisto, ĉiu, kiu uzas Esperanton por iu ajn celo. En la batalo inter la francaj intelektuloj, raciaj kaj teknikaj, kaj Zamenhof, la profeto de pli bona mondo kaj de homa frateco inter la diversreligiaj homoj, Zamenhof malgajnis. Sed li provis preni sian revenĝon en la inaŭgura parolado de la dua kongreso.

Li diris: "Se ni, batalantoj por Esperanto, propravole donis al la vasta mondo plenan rajton rigardi Esperanton nur de ĝia flanko praktika kaj uzadi ĝin nur por nia utilo, tio ĉi kompreneble al neniu donas la rajton postuli, ke ni ĉiuj vidu en Esperanto nur aferon praktikan. Bedaŭrinde en la lasta tempo inter la Esperantistoj aperis tiaj voĉoj, kiuj diras: "Esperanto estas nur lingvo; evitu ligi eĉ tute private la Esperantismon kun ia ideo, ĉar alie oni pensos ke ni ĉiuj havas tiun ideon, kaj ni malplaĉos al diversaj personoj, kiuj ne amas tiun ideon!" Ho kiaj vortoj! El la timo, ke ni eble ne plaĉos al tiuj personoj, kiuj mem volas uzi Esperanton nur por aferoj praktikaj por ili, ni devas ĉiuj elŝiri el nia koro tiun parton de la Esperantismo, kiu estas la plej grava, la plej sankta, tiun ideon, kiu estis la ĉefa celo de la afero de Esperanto, kiu estis la stelo, kiu ĉiam gvidadis ĉiujn batalantojn por Esperanto! Ho, ne, ne, neniam! Kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon. Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: "Kun tia Esperanto, kiu devas servi

ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!"

Tiuj samaj vortoj estas laŭ mi validaj ankoraŭ hodiaŭ, ĉar ankoraŭ hodiaŭ... aro da abomenindaj krimuloj, ...per diversaj kaj plej malnoblaj rimedoj, per amase dismetataj mensogoj kaj kalumnioj arte kreas teruran malamon inter unuj gentoj kaj aliaj."

Se vi malsamopiniis, kaj pensas ke la nunaj registaroj de la mondo agas nur por la bono de siaj civitanoj kaj de la tuta homaro, simple ĉesu legi kaj iru fiŝkapti aŭ promeni laŭ via prefero.

Se male vi opinias, ke esperantistoj devas uzi Esperanton por plibonigi la rilatojn de la homoj en la mondo, bonvolu plulegi.

Je tutmonda skalo Universala Esperanto-Asocio retenas siajn ligojn al Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko kaj tio estas la videbla formo nuntempa de la idearo de esperantistoj. Aliflanke ĉe internaciaj organizaĵoj ŝajne la afero ne multe progresas, ĉar Unuiĝintaj Nacioj iĝis preskaŭ unulingve anglalingva organizaĵo, dum nur Unesko konservas sian bonvolemon al Esperanto, kaj tiu bonvolemo certe estas uzinda informcele. Tiuj ligoj ŝuldiĝas al gvidanto kun vizio, Ivo Lapenna, kaj ili estas la sola eco de UEA, pri kiuj ĉiuj esperantistoj entuziasme raportas al la publiko, "en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko". Mi neniam vidis esperantistojn publike fieri ĉe neesperantistoj pri la belartaj konkursoj aŭ pri la revuo.

Esperantistoj en Eŭropo aparte provis adapti la ideojn de Esperanto al la tiea situacio, alivorte ili informas pri Esperanto kiel bonega neŭtrala lingvo por la multlingva Eŭropo. Ĉi tiu informado estas komprenata facile de eŭropaj civitanoj. Preter la troigoj de entuziasmegaj poreŭropaj zelotoj, mi dirus, ke la afero estas bona kreo de enhava ideo de Esperanto por

plibonigi la rilatojn en Eŭropo kaj ĝi estas tre uzebla en informado. Ĝi ligas Esperanton al konkreta problemo.

Esperantistoj en Afriko ĝis nun rifuzas ligi Esperanton al la afrikismaj klopodoj de la Unuiĝo por Afrika Unueco, kaj ili, laŭ mi eraras. Ili rifuzas doni al Esperanto idean enhavon taŭgan por Afriko, kaj pluparolas pri tutmonda frateco, dum en la realo ili celas kontaktojn kun esperantistoj el pli bonstataj landoj. Esence en Afriko oni ne havas manieron por digne respondi al la demando "Kial afrikanoj devas lerni Esperanton?"

Antaŭ kelkaj jaroj ekestis movado de la tiel nomataj landoj BRICS. Tiu mallongigo havas la komencajn literojn en la angla de la landoj Brazilo, Rusujo, Barato, Ĉinujo kaj Suda Afriko. Temis pri klopodo fare de landoj ekonomie



D-ro Renato Corsetti, eksprezidanto de UEA

evoluantaj krei por si spacon ekster la monda imperio de Usono kaj de la Monda Banko. Tiu klopodo estas salutinda kiel klopodo igi la mondon malpli dependa de nur unu centro, kaj, se ĝi sukcesos, tio povos havi ankaŭ lingvajn efikojn. Pro tio estas devo de esperantistoj ligi Esperanton al ĝi. Mi parolis pri devo, ĉar mi aparte serĉas rimedojn progresigi Esperanton en la mondo. Sed ankaŭ por aliaj ĝi estas minimume oportuno.

La provoj de esperantistoj fari ion tiurilate renkontis entuziasmon en la komenco. UEA konsentis pri starigo de laborgrupo, kiun sekvas la ĝenerala sekretario de UEA, sed tio daŭris nur ĝis kiam Usono okazigis puĉon en Brazilo por anstataŭigi la por-briksan registaron per alia pli por-usona. La provo de Usono sukcesis, sed ne pro tio la movado de la landoj briksaj haltis. Ankaŭ Brazilo vole-nevole plukunlaboras kaj la unuaj konkretaj faktoj okazas, kiel la kreo de Evolu-Banko de la briksaj landoj kun sidejo en Suda Afriko.

Nuntempe brazilaj esperantistoj

kunlaboras, sed ne prenas gvidan rolon en la rilatoj inter esperantistoj de la briksaj landoj. En Suda Afriko la kunlaboro estas bona. En Barato mankas la kunlaboranta instanco, la landa asocio de UEA. Estas pluraj kontaktoj kun individuaj barataj esperantistoj, sed ni atendas la momenton, kiam barataj esperantistoj decidus kunlabori inter si. En Rusujo estis granda kunlaboro en la komenco, ĉefe de la estrarano de REU Ĉertilov, kaj mi kredas, ke tio povus facile reveni. Tute aparta estas la situacio en Ĉinujo, kie la landa asocio formale konsentis kunlabori, sed kie la laboro ĉefe okazas en provincaj organizaĵoj. Sed Ĉinujo nuntempe havas sian grandan projekton "Unu zono, unu vojo". Ĝi estas mallongigita nomo de la Ekonomia Zono laŭ la Silka Vojo kaj tiu de la Mara Silka Vojo en la 21a Jarcento.

La ekonomia zono laŭ la silka vojo estas nova ekonomia regiono formata sur la bazo de la malnova silka vojo. La ekonomia zono, kun la azi-pacifika ekonomia sfero ĉe la Oriento kaj la

eŭropa ekonomia sfero ĉe la Okcidento, estas konsiderata kiel la plej longa kaj potencial-hava ekonomia koridoro. Plej grave, ĝi reprezentas la ideon pri kunordigita disvolvo de diversaj urboj laŭ la ekonomia zono.

Ĉi tiu projekto estas tre bone kunligebla kun tiu de la briksaj landoj. Do, ĉinaj esperantistoj havas la eblecon malkovri novan enhavon de Esperanto, kiu povas faciligi la realigon de la granda neesperantista projekto. Samtempe ili povas pensi pri helpo al la kelkaj, ne multaj, esperantistoj vivantaj laŭ la silka vojo. Tiuj esperantistoj vere bezonas helpon, kaj certe ne pretas doni al ili helpon okcidentaj esperantistoj. Sen ĉinoj ili estas perditaj.

Se vi volas labori por Esperanto laŭ ĉi tiuj ideoj, bonvolu kontakti je Renato Corsetti, renato.corsetti@gmail.com aŭ aliĝi al la listo esperanto-en-brics-landoj@yahoogroups.com. Donu al la revo de Zamenhof enhavon taŭgan por la 21-a jarcento.

Rusio eldonos ĉinlingvajn lernolibrojn por mezlernejoj



La 1-an de februaro, la Eduka Eldonejo de Rusio kaj la Popola Eduka Presejo de la Ĉina Eldona Grupo kune eldonos serion da ĉinlingvaj lernolibroj por rusaj mezlernejoj antaŭ septembro ĉi-jare. La lernolibroj estas kompilitaj por dua-fremdlingva lernado inter kvina- kaj naŭa-lernojaraj lernantoj, laŭ postulo de la ekzamenaj objektoj por eniri en universitatojn kaj tiu de ekzameno pri ĉinlingva nivelo. Nun tiuj lernolibroj estas prove uzataj de kvina-lernojaruloj en lernejoj de Moskvo, Sankt-Peterburgo, Primorsky Krai, Zabaykalsky Krai kaj Jakut. La Eduka Eldonejo de Rusio informis, ke tiuj lernolibroj estos enmetitaj en la liston de 2017-2018-lernojaraj lernolibroj por mez- kaj elementaj lernantoj, rekomenditaj de la Rusa Eduka Ministro. Laŭ donitaĵo de la Eduka kaj Scienca Superrigarda Buroo de Rusio, ĝis nun la ĉina lingvo estas instruata en 123 ŝtataj mez- kaj elementaj lernejoj de 34 federaciaj komunumoj de Rusio. La nombro de lernantoj, kiuj lernas la ĉinan lingvon, kalkuliĝis al pli ol 17 mil. Antaŭ tre longe, Rusio planis enlistigi la ĉinan lingvon kiel unu el la elektitaj ekzamenaj objektoj de fremdaj lingvoj por eniri en universitaton. Tamen la plano ne realiĝis pro manko de unuecaj lernolibroj.

82% ĉinaj voĉdonintoj apogas nuligi la anglan lingvon kiel devigan lernobjekton

La 4-an de marto, dum la kvina sesio de la 12-a TPK (Tutlanda Popola Kongreso) en Ĉinio, S-ro Li Guangyu, reprezentanto de la 12-a TPK, proponis nuligi la anglan lingvon en la ŝata ekzameno por eniri universitaton, kaj fari la anglan lingvon nedeviga lernobjekto en elementa kaj meza lernejoj. La plej nova statistiko el Ĉina Eduka Ministerio montras, ke la ĉinaj infanoj elspezas 163,78 RBM (ĉirkaŭ 24,10 USD) pro la deviga angla lingva lernado ĉiujare. La jara konsumo pro la angla lingva lernado egalas minimume al 0.8 sumo investita en konstruado de la akvo-barajo de la Tri Foldoj en Hubei de Ĉinio, la plej granda elektroprodukta akvo-barajo en mondo, aŭ al la sumo por produkti 204 kosmoŝipojn.

En la esplorado kaj enketo en provincaj ĉefurboj en mezaj Ĉinio, li rimarkis ke la lernantoj ĉiutage elspezas multan tempon: 1 horon en elementaj lernejoj, 1.5 horojn en mezlernejoj, 2 horojn en supermezlernejoj, inkluzive de leciono, matena legado, ekzerco, lernotasko kaj eksterlerneja helpa lernado. De la tria jaro en elementa lernejo ĝis la tria jaro en la superlernejo, ĉiu lernanto elspezas minimume 5292.5 horojn por la angla lingvo. Se la lernantoj lernas 8 horojn tage, ili elspezas preskaŭ kvinonon (ĉirkaŭ 18.13%) da tempo okupiĝante en lernado de la angla lingvo dum 10 jaroj, la plej bona periodo de la infano.

En lia enketado multegaj lernantoj plendis ke multaj gepatroj registrigis la infanojn al eksterlernejaj helpaj kursoj de la angla lingvo, krom la lernado en klasĉambro, post leciona ekzameno kaj hejmtasko. La eksterlerneja lernado de la angla lingvo rabis multan tempon de la



S-ro Li Guangyu proponas nuligi la anglan lingvon kiel devigan lernobjekton en la konferenco

infanoj en la ekster-klasĉambra aktivado, ludado, eĉ dormado kaj ripozo. La infanoj sentas pezan ŝarĝon el la angla lingvo.

Li Guangyu montris ke la angla lingva ekzameno en la ŝtata ekzameno por eniri universitaton pliigis la ŝarĝon sur la lernantoj. Iuj lernantoj lernas la anglan lingvon por studi eksterlande, kaj por multaj lernantoj la angla lingvo estas deviga kaj kontraŭvola elekto.

La 6-an de marto, dum la 5-a sesio de la 12a ĈPPIK (Nacia Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco), komitatano S-ro Wang Chengde, prezidanto de Pekina Ĉintradicia Hospitalo Shungtiande, faris similan proponon: fortigi ĉinlingvan instruadon kaj limigi fremdlingvan instruadon en ĉiuj lernejoj. En pasintaj jaroj li alvokis fortigi instruadon de la ĉina lingvo. En la jaro 2013 li sendis al la Ĉina Popola

Politika Konsultiĝa Konferenco proponon "atenti instruadon de gepatra lingvo, levi anglan lingvan kapablon de lernantoj." kaj en la jaro 2014 li sendis la proponon "fortigi ĉinlingvan instruadon kaj limigi fremdlingvan instruadon en ĉiuj lernejoj." En ĉijara konferenco li refoje sendis la lastan proponon. En la titolo de la propono ne troviĝas angla lingvo, tamen en la teksto de la propono li menciis nur la anglan lingvon. Li diris: "En lastaj jaroj aperas stranga fenomeno, ke varmas fremdlingva lernado kaj malvarmas la lernado de ĉina lingvo. Oni lernas fremdan lingvon ekde infanĝardeno ĝis universitato. Multaj studentoj en universitatoj povas flue paroli en la angla lingvo, tamen ne povas lerte uzi la ĉinan lingvo, eĉ ne povas skribi disertajon. La skribaĵoj estas kun multaj eraroj kaj nelogikaj." "La angla lingvo estas ilo per kiu multaj edukaj organizoj de la angla lingvo trompe rabas monojn de lernantoj. Tio pliigis la ŝarĝon al la gepatro. Ĉinio estas unika lando kie la angla lingvo estas ĉefa lernobjekto, kaj kie lernotempo en lernejo estas la plej longa en la mondo." Li proponis reformi la edukan regularon. Oni devas instrui fremdlandan lingvon laŭ bezono kaj fako. La infanoj elspezas kvinonon da tempo dum 10 jaroj por lerni la anglan lingvon. Por ke la infanoj bone lernu la ĉinan lingvon, matematikon, fizikon kaj kemion, li proponis nuligi ekzamenon de la angla lingvo en mezlernejo kaj por ŝtata ekzameno. Li alvokis ke la universitatoj en Ĉinio elektu la ĉinan lingvon kiel devigan lernobjekton. *Trezoro Huang Yinbao*



S-ro Wang Chengde proponas limigi instruado de fremda lingvo en la konferenco

Pensoj pri la taŭgaj instrumentoj de Esperanto por ĉinoj

■ Han Zuwu (Ĉinio)

En la nuna tempo pli kaj pli aktiviĝas la internacia lingvo Esperanto en la interkomunikado inter landoj kaj nacioj en la mondo. Samtempe la uzado de Esperanto pli kaj pli multiĝas en diversaj kampoj. Pro tio scipovo de Esperanto necesigas lernadon kaj altigon de la lingvo por la uzantoj, kiuj ellernas mem kaj kurse. Por tiu celo instruistoj devas posedi la taŭgajn metodojn por lernigi la lernantojn.

Mi estis instruisto de la rusa kaj angla lingvoj dum 40 jaroj. En nia urbo Tianjin aperis la Esperanto-kurso, gvidita de la germana doktoro Karl Maier en la 30-aj jaroj de la 20-a jarcento kaj de la jaro 1983 ekfunkciis Esperanto-kursoj preskaŭ ĉiujare. Mi, kiel unu el la instruistoj, instruas Esperanton dum 33 jaroj ekde 1983 kaj neniam forgesas serĉi la taŭgajn metodojn por ĉinaj lernantoj.

Nuna stato de la Esperanto-instruado en Ĉinio

1. Kun la disvastiĝo de la Esperanto-movado en Ĉinio, la instruado de Esperanto vastiĝas kaj profundiĝas tagon post tago. Dume la diversaj instrumentoj formiĝas, ekz. rekta metodo, traduka metodo, gramatika metodo, diskuta metodo ktp.

Nuntempe ĉefe funkcias la "tradicia" kompleksa instrumentado aŭskulta, parola kaj traduka en la plejparto de Ĉinio.

2. La disvolviĝo de la Esperanta instruado ne estas ekvilibra en la diversaj partoj de la lando. La nombro de la Esperanto-kursoj multiĝas iom post iom, sed la kvalito ne estas bona. Pro tio, oni ofte renkontas "ĉiamajn komencantojn", kiuj lernas nian lingvon multajn jarojn.

3. La instruaj nivelo kaj kapablo de la instruistoj estas malsamaj. Malmultaj el ili trapasis la koncernajn internaciajn ekzamenojn de ILEI/UEA aŭ trejnajn kursojn por Esperanto-instruistoj, posedantaj bonajn instruajn metodojn kaj kapablon. Sed iuj ne havas sufiĉe ĝustan prononcon, sufiĉe multan kvanton da vortoj, sufiĉe altajn aŭskultan kaj parolan kapablojn, sufiĉe riĉajn gramatikajn sciojn. Estas malfacile imageble, ke aperus kvalifikitaj esperantistoj gviditaj de tiuj ĉi instruistoj.

4. En Ĉinio ankoraŭ ne ekzistas organizo, institucio aŭ asocio kiu prizorgas, kontrolas kaj regas pri la problemoj.

Ĉu la Ĉe-metodo taŭgas por ĉinaj lernantoj?

La instru-metodoj estas malsamaj en

malsamaj periodoj kaj diversaj lokoj, ekz. traduka metodo, kompara metodo, diskuta metodo, aŭskult-parola metodo, ĝojiga metodo, rekta metodo ktp. La rekta metodo estas uzanta la paroligan kaj konversacian lernolibrojn kiel la ĉefan enhavon. Dum la lernado instruisto postulas lernantojn aŭskulti, ripeti, imiti po frazo kaj fari foj-refojan ekzercadon por havi lingvan kutimon. En la instruado la ĉefan rolon ludas instruistoj, kiuj uzas la intuician manieron kiel geste, move, vizaĝesprime, objekte, bilde ktp. Instruistoj rifuzas nacian lingvon. Fakte la rekta metodo tre similas al Ĉe-metodo. Ni bone scias, ke la Ĉe-metodo estas kreita de la hungara esperantisto Andreo Cseh. Lia metodo konsistas el:

1. neuzado de lernolibro;
2. neuzado de nacia lingvo, sed klarigo de la novaj vortoj per la jam instruitaj;
3. komuna ĥora respondado de la kursanoj;
4. aplikado de konversacio pri aktualaĵoj anstataŭ uzado de lernecaj ekzemploj;
5. riĉa aplikado de humuro kaj ŝerco;
6. instigo al tio, ke la lernantoj mem eltrovu la regulojn de la lingvo kaj ke ili mem konstruu la gramatikan sistemon.

Estas menciite, ke populariĝas la moderna Ĉe-metodo en instruado de Esperanto en Eŭropaj landoj aŭ aliregionoj.

Ĉefe estas, ke la instruisto faras Esperantan lingvan medion, kiu tre utilas por la lernantoj por scipovi la lingvon.

Ĉu la Ĉe-metodo taŭgas por ĉinaj lernantoj? Ne tute.

1. Ĉinoj parolas la ĉinan lingvon, kiu havas siajn kvadratformajn ideografiaĵojn, similajn al la objektoj, ekzemple la vorto "suno", "ĉevalo", "monto", "fiŝo" ktp. Kaj la prononco estas tute malsama al ĝia skribo. Tiu ĉi ortografio de la ĉina lingvo estas malsama al tiu de la eŭropaj kaj aliaj alfabetaj lingvoj.

2. En la komenca periodo de lernado, lernantoj devas kutimiĝi al la prononco de literoj, vortoj kaj frazoj. La vortkvanto estas unu el la plej necesaj bazoj de la komprenado de la Esperanto-parolantoj, due la ĝusta prononco de la parolantoj estas la alia kondiĉo por bona kompreno.



3. La diferenco de la pensmaniero inter la eŭropanoj kaj ĉinoj influas la rapidon de la komprenado.

4. La vortkvaranto estas grava kondiĉo por bona kompreno. Kvankam la instruisto klarigas la signifon de la novaj vortoj, aparte de la abstraktaj vortoj al lernantoj per la jam instruitaj elspezinte la relative longan tempon, la lernantoj ankoraŭ malfacile komprenas, ĉar la lernantoj ne havas sufiĉajn vortojn.

Ĉu la Ĉe-metodaj instruistoj respondas al la bezono de la instruado?

Ege gravas, ke ili devas havi altan kapablon bone instrui.

Ĝuste pro tio, la instruistoj uzantaj Ĉe-metodon devas posedi la ĝustan prononcon, bonajn sciojn pri la leksiko kaj gramatiko, poste la taŭgan manieron por interesi kaj aktivigi la lernantojn.

La problemoj de la ĉinaj lernantoj estas, ke

1. Mankas al lernantoj kapablaj instruistoj neuzantaj nacian lingvon;

2. Mankas al lernantoj sufiĉa kvanto da vortoj, per kiuj la instruisto klarigas la abstraktajn vortojn;

3. Mankas al lernantoj la eŭropa pensmaniero kaj vortordo de frazoj.

Estas menciinde, ke instruistoj devas bone instrui, kaj ili devas kapabli instrui.

La plej grava punkto estas havi kapablajn instruistojn kun la altnivela instruaro.

Malgraŭ tio, ke la instruistoj klopodas paroli Esperanton kiel eble plej multe, ne tute rifuzante la nacian lingvon en la instruado, la konduto pri la uzado de la nacia lingvo fariĝas de absoluto al kompromiso iom post iom. La esplorado de naskiĝlando, eksperimentado kaj reformado de la Ĉe-metodo estas necesaj en specialeco, praktikeco kaj sociuzebleco.

Miaj pensoj

Baze de la enhavo, proceso, kondiĉo kaj efiko de la Ĉe-metodo kaj ĉina aktuala situacio, iom da pensoj venas en mian kapon.

1. La aplikado estas la premiso de la instruado. Esperanto veninta de Eŭropo estas multe pli malfacila por ĉinaj lernantoj ol eŭropaj. La fundamenta vojo por posedi Esperanton estas la uzado, la instruado estas nur helpi la lernantojn en la interkomunikado per Esperanto, sed ne estas lerni iom da mekanikaj scioj. Ni devas instrui la lingvon kiel ilon de interkomunikado, partoprenigante la

lernantojn en sufiĉaj interkomunikiĝaj aktivadoj.

2. Ni devas esplori Ĉe-metodon kaj kombini ĝin kun la nunaj modernaj instrumentadoj, kun la ĉinaj tradiciaj efikaj instrumentadoj, por ke ni kreu la instrumentadojn taŭgajn al ĉinoj en la lernado de Esperanto kun ĉinaj trajtoj.

3. Por kreskigi pli da kvalifikitaj instruistoj de Esperanto, la faka asocio de Ĉina sekcio de ILEI/UEA devas respondi pri la trejnado kaj kulturado de la instruistoj pere de la organizado de la concernaj kursoj kaj la internaciaj ekzamenoj de ILEI. Nur tiuj, kiuj posedas la instruan fakan kvalifikan ateston, havu rajton instrui al lernantoj.

La instrumentadoj ne estas unusolaj, sed interligaj kaj interhelpaj unu al la alia. La faktoj montras, se ni ne povas apliki Esperanton en diverskampoj, se ni ne havas relative altan lingvan nivelon de Esperanto, do ni ne kredigos al la homoj pri tio, ke Esperanto fariĝas la internacia lingvo en la diversflanka interfluo inter malsamaj landoj tra la mondo.

Mi ripetu refoje: se la esperantistoj kulturitaj de ni ne povas paroli Esperanton, do nia instruado estas malsukcesa.

Esperanto, lingvo ne facila por ĉinoj

■ Solis Liu Xiaozhe (Ĉinio)

Por ĉinoj, ĉu Esperanto estas pli facila ol aliaj fremdaj lingvoj? Jes, almenaŭ ĝi estas multe pli facila ol la angla.

Sed por ĉinoj, ĉu Esperanto estas facila? Ne! Por ĉinoj, ĝi ne estas facila lingvo, kaj eĉ oni povas konstati, ke ĝi estas malfacila lingvo.

Oni ofte legas, ke eŭropano ekparolas flue en Esperanto post lernado de nur kelkaj monatoj. Sed tia ekzemplo estas sen-signifa por ĉinoj. Multaj ĉinaj lernantoj ne kapablas flue paroli Esperante eĉ post lernado dum pli ol 10 jaroj!

Kial estas tia afero? Ĉu ĉinoj estas pli maldiligentaj aŭ pli mallertaj ol eŭropanoj je la lernado? Certe ne! Por eŭropanoj, Esperanto estas nur varianto de sia gepatra lingvo, sed por ĉinoj, ĝi estas tute nova fremda lingvo!

La prononco kaj gramatiko de Esperanto estas regulaj, kaj la ne-norma prononco kaj eraroj en la gramatiko fakte ne serioze influas la komunikadon per Esperanto. Por ĉinaj lernantoj, la plej

malfacila punkto estas la vortoj, la 2500 bazaj vortoj, kiuj estas tute fremdaj por ĉinoj.

Sed tio ne estas problemo por eŭropanoj, kiuj konas grandparton de tiuj vortoj sen lernado.

Eble iuj malkaŝe ridas: ĉinoj eĉ ne kapable memoras tiom da vortojn? Sed pensu, kiom da eŭropaj plen-kreskuloj povas memori 2500 ĉinajn ideografiaĵojn, kiom jam sufiĉas por kompreni ĉinajn ĵurnalojn kaj gazetojn? Por plejparto de plen-kreskuloj, ekster la reala lingva ĉirkaŭaĵo, lerni tute novan lingvon estas ege malfacila!

Estas klare, ke la kvanto de la vortoj estas obstaklo, kiun ĉinaj lernantoj devas konkeri.

Sed estas iom domaĝe, aŭ pli rekte dirite, estas abomeninde, ke eŭropaj esperantistoj ankoraŭ daŭre aldonas novajn vortojn al Esperanto. Forlasinte vortojn longajn, sed facile memoreblajn, eŭropanoj aldonas vortojn mallongajn, sed

tute fremdajn por ne-eŭropanoj, ekzemple, malrapida kaj lanta, maldiligenta kaj pigra, malnova kaj olda, ktp. Tio plimalfaciligas Esperanton, kaj for-timigas la novajn lernantojn, kaj fakte helpas la kontraŭstarantojn de Esperanto.



Solis Liu Xiaozhe

Emociaj kialoj por uzi Esperanton

■ *Vicente Manzano-Arrondo (Hispanio)*

Dum aprilo 2006, pluraj sciencistoj renkontiĝis en Madrido (Hispanio) por interparoli pri la monda estonteco rilate al planeda medio. Oni povis aŭdi multajn argumentojn por ŝanĝi niajn vivmanieron kaj produktmanieron. Oni povis renkonti tro da fojojn la saman demandon: "kial ni ne povas stimuli paŝon ĉe la socio, kvankam ni ja havas ĉiujn argumentojn por fari tion?" Kiam mi komencis mia prelego, mi klopodis bati la menson de miaj kolegoj per la jena aforismo: "geamikoj, se ni nur havas kialon, ni havas nenion". Fakte, la konduto ne ŝanĝiĝas per kialoj sed per emocioj. Plej ofte ni unue sentas kaj poste fundamentas. Pro tio, tiom da argumentoj nur ŝajnas esti argumentoj, sed ili ne havas argumentan logikon. Pro tio, por multaj elektantoj ne gravas la logika enhavo de la politikaj diskursoj aŭ la potenco de ĝiaj argumentoj, sed tiuj konkludoj, kiuj subtenas sian pensmanieron. Sammaniere, multaj legantoj ne legas por koni la mondon, sed por subteni sian mondbildon. Tiel la emocioj gvidas, kvankam ĉiu homo kiale pravigas sin.

Dek jarojn poste mi alvenis al Esperantujo forgesante mian antaŭan aforismon. Mia kialo por lerni E-on estis normalega: kunlabori por la alveno de pli bona mondo. Tamen, mi demandas min nun: "ĉu tio estas kialo aŭ emocio?" Se unue mi sentas kaj due mi fundamentas, kial mi volas

ekde la komenco argumenti por faciligi al aliulo sian "konverton"? Preskaŭ oni estus tentita krei, kvazaŭ *Tertuliano**, "Mi kredas je Esperanto ĉar tio estas absurda!"

La 21-an de la pasinta aprilo, kelkaj universitataj aktivuloj organizis plenan tag-agadon pri Esperanto kaj Universitato ĉe la Universitato de Seviljo (suda Hispanio). Ni malŝarĝis niajn ĉiujn argumentojn por montri E-on kiel la plej bonan elekton por universitata komunikado. Per la rezultoj de niaj propraj esploroj, per resumoj el la faka scienca literaturo, kaj per aliaj povaj argumentoj, ni klopodis konvinki la ĉeestintojn pri la avantaĝoj de Esperanto. Aldone, ni faris atelieron por eklerni la lingvon. La plimulto el la partoprenintoj sciis nenion pri Esperanto. Dek horojn poste, videble lacaj, ili papere opiniis pri la seminario. Interese, preskaŭ neniu menciis la prelegojn. Preskaŭ neniu skribis ion pri la menciitaj kialoj por elekti Esperanton, aŭ pri la menciitaj argumentoj rilate al malbona elekto de la angla kvazaŭ internacia lingvo. Preskaŭ ĉiuj el la partoprenintoj emocie skribis, ke ili sentis sin bonege parolante siajn unuajn Esperantajn vortojn, ke ili malkovris bonajn homojn kun belaj koroj, kaj ke ili komencis pensi pri lingva justeco.

El tiu perspektivo, ŝajnas, ke oni bezonas argumentojn por kiam la homoj volu aŭskulti ilin, sed unue oni bezonas kontaktiĝi kun la pli vasta emocia flanko.



Vicente Manzano-Arrondo

Diru al mi kion vi sentas hodiaŭ, kaj mi diros al vi kion vi pensos morgaŭ.

Konklude, mi ne laŭlitere defendas ĉion kion mi diras ĉi tie. Mi volas bati mensojn. La argumentoj tre gravas, sed nur argumentoj estas kvazaŭ la akvo, kiu forglitas inter la fingroj.

Se vi volas koni pli pri la seminario aŭ pri la agado de la sevila universitata grupo, aŭ vi ŝatas kunlabori rilate al niaj agadoj aŭ esploradoj, bonvolu skribi al ni (*esperanto@us.es*).

**Tertuliano estis teologo en la dua jarcento, kiu skribis "Mi kredas ĉar ĝi estas absurda!" rilate al kristana fido. Li tiel klopodis fermi sensukcese la diskutadon pri la kialoj de la fido.*



Internacia Scienca Asocio Esperanta (ISAE)

Pli ol 110 jaroj da historio

La ĉefaj fondintoj de ISAE (dum la kembriĝa kunveno en 1906)



Kaj nun?



Kial oni kreis ISAE-n?

- Kunigi sciencistojn per la uzado de Esperanto kiel pontolingvo;
- Propagandi Esperanton kiel lingvon taŭga por scienco;
- Faciligi la internacian kontakton inter sciencistoj de diversaj landoj per justa kaj egaleca lingvo.

Misio


- Stimuli la uzadon de Esperanto inter sciencistoj;
- Disvastigi la gravecon de scienco inter esperanto-parolantoj;
- Oferti fakvortojn en Esperanto por ebligi la komunikadon inter sciencistoj el diversaj sciencaj areoj.

Celoj

- Disvastigi sciencajn konojn kaj sintenon pere de Esperanto kaj la uzadon de Esperanto inter sciencamikoj, sciencistoj kaj teknikistoj el ĉiuj sciencaj fakoj (natura sciencaj kaj socia sciencaj);
- Ĝia fokuso rilatas al la lingva aspekto de la sciencaj edukado kaj komunikado.

Kiel ni faris tion?

- Per *SciencA Revuo* kaj aliaj eldonaĵoj.
- Kunvenoj dum Universalaj Kongresoj.
- Sciencaj eventoj.
- Prelegoj.



ISAE hodiaŭ

- Pli ol 50 popularig-sciencaj artikoloj jare;
- 400 legantoj monate inter Aŭgusto 2016 kaj Marto 2017;
- Pli ol 275 sekvantoj en Facebook;
- La Facebook profilo estas viditaj en pli ol 40 landoj;
- Multfoje la homoj kiuj vidas nian paĝon parolas la anglan;

Kiel ni povas kontribui al ISAE?

- Fariĝu membro de ISAE (estas senpaga) - la formularo por membriĝo troviĝas en nia retpaĝo <https://scienc-a-revuo.info>
- Aĉetu niajn varojn (ni vendas aron da kolektoj el niaj tekstoj je simbola kosto) - estas simple kaj facile;
- Donacu al ISAE (ĉiu donaco estas bonvena, por ke ni daŭre antaŭenigu nian agadon), UEA-konto : isae-z.
- Verku por nia blogo pri sciencaj novaĵoj kaj propagandu nian asocion inter viaj konatuloj

Estraranoj de ISAE

Anthony Lucas
Prezidanto (Francio)



Wendel Pontes
Vicprezidanto (Brazilo)



Orlando Raola
Estrarano (Usono)



Ana Ribeiro
Estrarano (Brazilo)



Johannes Müeller
Estrarano (Germanio)



Trezo Huang Yinbao
Estrarano (Ĉinio)



Francesco Maurelli
Estrarano (Italio)



Unesko-Kuriero aperos en Esperanto

■ **Trezoro Huang Yinbao (Ĉinio)**

Unesko-Kuriero estas la oficiala revuo de Unesko (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo). Ĝi ekaperis en 1946. Kiel grava komunikilo por disvastigi la ideojn de Unesko kaj promocii la interkulturajn dialogojn, la revuo iam ludis gvidan rolon por disvolvi la misiojn de la internacia organizaĵo en la kampoj pri kiuj ĝi respondecas.

Dum la pasintaj jardekoj multaj esperantistoj alvokis ke Unesko eldonu la revuon *Unesko-Kuriero* ankaŭ en Esperanto. La konata aktivulo S-ano Mario Fonseca alvokis por inundi Uneskon per petoj, ke Unesko komencu eldoni ĝin ankaŭ en Esperanto. Laŭ lia alvoko esperantistoj sendinte al Unesko amason da retaj mesaĝoj, ĝenis la funkciulojn de Unesko, kiu multfoje plendis al UEA pri proponoj de individuaj esperantistoj pri oficialigo de Esperanto, ĝia instruado, eldonado de Esperanta versio de *Unesko-kuriero*. En la jaro 2000, laŭ la postulo de Unesko, tiam ĝenerala direktoro rete publikigis malferman leteron por haltigi la agadon. En la malferma letero Osmo skribis: "Dum la pasintaj jardekoj UEA jam plurfoje diskutis pri la sama ideo kun respondeculoj de Unesko. Kvankam ŝanĝiĝis la respondeculoj, la respondo restis la sama: se UEA aŭ iu alia pretas financi ĉion, Unesko pretas doni permeson al Esperanta eldono de *Unesko-Kuriero*." (el *Eventoj*, n-ro 182, 2/marto-2000.)

Post lia alvoko oni ĉesis la mesaĝan bombadon al Unesko. Multaj esperantistoj

konsciis ke la Esperanta *Unesko-Kuriero* estus ege valora revuo, per kiu ni povus montri al la mondo ke Unesko subtenas Esperanton. Bedaŭrinde la Kuriero devige ĉesis ekde 2012 pro manko de financaj rimedoj. Ekde tiam malaperis la penado ĉe nia esperantistaro.

La 17-an de oktobro 2016, la ĉina registaro subskribis memorandon de kunlaboro kun Unesko por financi la denovan publikigon de la *Unesko-Kuriero* per 5.6 milionoj da usonaj dolaroj. La 12-an de majo 2017, la 1-a numero (aprilo-junia) de la trimonata revuo eldoniĝis en la ĉina, angla kaj franca lingvoj kun aparte po 76 paĝoj. Tamen malaperis la iama aktivulo s-ano Mario Fonseca. Rete troveblas nur la alvoko de Osmo Buller, tiam Ĝenerala Direktoro de CO de UEA, aperinta en la jaro 2000. Ĉu ni daŭre ĵetos la mesaĝajn bombojn al Unesko aŭ kunlaboros por eldoni ĝin en Esperanto?

Nova espero videblas en la anonco "UEA serĉas tradukistojn kaj provlegantojn por *Unesko-Kuriero*" el la *Gazetaraj Komunikoj* n-ro 684, fare de UEA la 23-an de majo. Laŭ iniciato de la UEA-komitatano Trezoro Huang Yinbao, pretiĝas eksperimenta eldono de la *Kuriero* en Esperanto. La teknika laboro okazos en Ĉinio, sed pri la tradukado kaj redaktado kunlaboros homoj el diversaj landoj. Post la anonco, pli ol 30 esperantistoj el 22 landoj partoprenis en la tradukado kaj provlegado. Kortuŝe!



Dank' al internacia kunlaboro, kaj financa kontribuo de Esperanto-Centro Ora Ponto (Ĉinio), la 1-a numero de *Unesko-Kuriero* en Esperanto baldaŭ eldoniĝos.

Nun ĉiuj tradukistoj kaj provlegistoj laboras senpage. Por daŭrigi la eldonadon, ni devas finfine pagi la tradukan kaj provlegan laboradon. Nur tiel la eldonado povos esti daŭripova. Tiu kiu ne havas tempon traduki aŭ provlegi, povus kontribui per mondonaco, aŭ reklamo en reklama paĝo de la *Kuriero*.

UEA serĉas tradukistojn kaj provlegantojn por *Unesko-Kuriero*

Post kelkajara paŭzo pro financaj malfacilaĵoj, la fama revuo de Unesko reaperas kadre de interkonsento inter la ĉina registaro kaj la Organizaĵo de UN por Edukado, Scienco kaj Kulturo. Ekde nun ĝi eldoniĝos kvarfoje jare en la ĉina, angla kaj franca lingvoj, sed Unesko ankaŭ libere permesas alilingvajn eldonojn, se oni trovas por tio la financajn rimedojn.

Laŭ iniciato de la UEA-komitatano Trezoro Huang Yinbao, pretiĝas eksperimenta eldono de la *Kuriero* en Esperanto. Same kiel por la alilingvaj eldonoj, la teknika laboro okazos en Ĉinio, sed pri la tradukado kaj redaktado kunlaboros homoj el diversaj landoj. Nun la ĉefa bezono estas tradukistoj kaj provlegantoj kiuj kapablas redoni la tre diverssternajn, klerajn artikolojn

en bona kaj flua lingvaĵo. Se vi regas Esperanton je nivelo C1 aŭ pli alte, se vi ŝatas interesan kaj defian traduklaboron, kaj se vi povas regule disponigi vian tempon por tia kunlaboro, bonvolu skribi rekte al la projekto-kunordiganto Trezoro Huang Yinbao: trezoro@qq.com.

(el *Gazetaraj Komunikoj* de UEA n-ro 684)

Alvoko de Osmo Buller en 2000

Karaj gesamideanoj,

S-ano Mario Fonseca alvokis por inundi *Unesko-Kurieron* per petoj, ke Unesko komencu eldoni ĝin ankaŭ en Esperanto.

S-ano Fonseca estas konata kiel aktiva serĉanto de novaj ideoj kaj agadmanieroj, sed ĉi-foje mi ne povas apogi lian ideon.

Dum la pasintaj jardekoj UEA jam plurfoje diskutis pri la sama ideo kun respondeculoj de Unesko. Kvankam ŝanĝiĝis la respondeculoj, la respondo restis la sama: se UEA aŭ iu alia pretas financi ĉion, Unesko pretas doni permeson al Esperanta eldono de *Unesko-Kuriero*.

Mi konsilas ne komenci bombardi Uneskon per petoj pri Esperanta eldono, ĉar ne ekzistas ebleco por ĝia realigo!

Krome, Unesko jam multfoje plendis al UEA pri proponoj de individuaj esperantistoj pri oficialigo de Esperanto, ĝia instruado, ktp. Ili nur ĝenas la funkciulojn de Unesko kies sinteno estas, ke esperantistoj devas fari siajn proponojn al UEA aŭ ILEI, kiuj reprezentas ilin ĉe Unesko.

UEA kaj ILEI estas do perantoj inter Unesko kaj esperantistaro, sed tio ne signifas, ke ili aŭtomate transsendos al Unesko la proponojn de individuaj esperantistoj. Unesko atendas, ke UEA kaj ILEI mem prijuĝu, kio estas saĝa kaj ebla. Se UEA kaj

ILEI foje trovos bona, ke iu propono estu subtenata per rektaj leteroj de unuopuloj, ili mem alvokos por tio.

Financado de Unesko-Kuriero per propraj fortoj de UEA kaj nia movado ankaŭ ne eblas. Eĉ se oni eldonus ĝin en pli modesta grafika vesto kaj en iu malmultekosta lando kaj pagus nenion al la tradukantoj k.a. kunlaborantoj, ĝi tamen kostus pli ol ni povus elteni. Per abonoj certe ne eblas kovri la kostojn. De tempo al tempo ni taksis, kiom ĉio povus kosti, kaj konkludis ĉiufoje ke tiu revo ne estas realigebla.

Nia alternativo estas ĉerpi artikolojn el *Unesko-Kuriero* kaj aliaj eldonaĵoj de Unesko (precipe Unesko-Fontoj), kion regule faras Kontakto kaj ankaŭ la revuo Esperanto. Mi alvokas ankaŭ aliajn Esperanto-gazetojn fari tion. Pri ĉiuj aperigoj Unesko estas informata. Krome, UEA eldonis jam kelkajn librojn de Unesko. Ankaŭ tion Unesko tre aprezas. Cetere, ni devas raporti al Unesko ĉiujare pri la nombro de ilia vendado. Tiujn ciferojn oni kompreneble kun granda intereso rigardas en Unesko, ĉar ili donas ideon pri la grandeco de la Esperanta merkato kaj pri la efektiva interesiĝo de esperantistoj pri Unesko. Ni ĉiam sendas al Unesko verajn ciferojn. Por ke ili estu kiel eble plej belaj, oni vaste diskonigu kaj aĉetu tiujn librojn!



Osmo Buller
eksĝenerala direktoro de UEA

Komence de la 90-aj jaroj estis fondita la asocio Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo, kiu eldonis la gazeton Monda Forumo. Temis fakte pri esperantista Unesko-asocio laŭ la ideo de similaj landaj asocioj. Ĝi tamen endormiĝis pro manko de aktivuloj kaj ĉesis aperi ankaŭ ĝia gazeto, kiu eldonis i.a. artikolojn originale aperintajn en Unesko-eldonaĵoj.

Unesko-Kuriero estus multege pli granda entrepreno, sed eĉ la modesta Monda Forumo superis niajn eblojn. Mi tamen esperas, ke Monda Kunagado kaj Monda Forumo estas ankoraŭ revivigeblaj.

Kun uneskismaj salutoj,
Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA
el *Eventoj*, n-ro 182, 2/marto-2000

36 volontuloj el 22 landoj kunlaboras Teamo de la Unesko-Kuriero en Esperanto

Tradukantoj

(25 personoj el 17 landoj, listigitaj laŭ fintraduka tempo.)

Bak Giwan (Koreio)
Mixi (Usono)
Renato Corsetti (Britio)
Pablo Leon (Argentino)
Nicola Minnaja (Italio)
Vilhelmo Lutermano (Kubo)
P.V.Ranganayakulu (Barato)
James Rêzende Piton/Jajro (Brazilo)
János Petik (Hungario)
Ileana Schröder (Danio)
Hamzeh Shafiee (Irano)
Lucas Barbosa (Brazilo)
Tell Bouvier Pjer (Francio)
Minosun Xiong Lingping (Ĉinio)
Johan Derks (Nederlando)
Adjévi Adjé (Togolando)
Kees Neeft (Nederlando)
Saed Abbasi (Irano)
Christian Lavarenne (Francio)
Andrej Pechonkin (Rusio)
Jose Antonio Vergara Olavarria (Ĉilio)
Chen Ji (Ĉinio)
Gilles-Philippe Morin (Kanado)

Jitka Skalicka (Italio).

Provlegistoj

(12 personoj el 12 landoj.)
Rob Moerbeek (Nederlando)
Hamzeh Shafiee (Irano)
Radojica Petrovic (Serbio)
Małgosia Komarnicka (Pollando)
Anna Bennett (Usono)
Guy Matte (Kanado)
Raïta Pyhälä (Finnlando)
Johan Derks (Nederlando)
Andrej Pechonkin (Rusio)
Stefano Keller (Svisio)
Navin Shrest (Nepalo)
Trigo Peng Zhengming (Ĉinio).

Teamo el la Estraro de UEA

Mark T. Fettes (prezidanto)
Maria Rosaria Spanò (estrarano).
Veronika Poór (Ĝenerala Direktoro).

Kunordiganto kaj redaktoro

Trezoro Huang Yinbao (Ĉinio).

Donacu al la Unesko- Kuriero en Eo

La Ĉina Registaro donacis 5.6 milionojn da dolaroj por eldoni la *Unesko-Kurieron* en ĉina, angla kaj franca lingvoj.

Post la eldono de la kuriero, 36 esperantistoj el 22 landoj, tuj komencis kunlabori por eldoni ĝin ankaŭ en Esperanto laŭ alvoko de UEA.

Ankaŭ vi povas kontribui per via mondonaco al la UEA-konto "huyi-j" kun indiko "donaco por subteni eldonon de Unesko-Kuriero en Esperanto".

Donacantoj bv. nepre sendi kopion de la ĝira mesaĝo al la kunordiganto de la projekto de *Unesko-Kuriero* en Esperanto: Trezoro Huang Yinbao "trezoro@qq.com".



Omaĝe al Zamenhof: placo inaŭgurita en Herzberg

En Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo - el projekto de aktivuloj de la Esperanto-Centro - ekestis Zamenhof-placo. La inaŭguro okazis la 8an de aprilo 2017. La ĝis tiam sennoma placo en centra loko de la urbo, kie jam ekde 15.12.2009 staras la Zamenhof-monumento, ricevis la nomon de la iniciatinto de Esperanto.

Memorfesto laŭ Unesko-rekomendo

La plano pri la nomdonado estis unuanime akceptita de la urbaj instancoj en 2016 kaj la memorfesto estis kunordigita por digna festado en la jubilea jaro por memori - laŭ rekomendo de Unesko - la 100-an mortodatrevenon de la aŭtoro de Esperanto.

Bela solenaĵo: La Esperanto-Centro preparis plurhoran programon por tiu speciala memortago. Sur la placo kolektiĝis multaj esperantistoj, estis invitita Esperanto-kantgrupo el Halle, kiuj ne nur bele kantis kun gitarakompano sed ankaŭ kantigis la ĉeestantan publikon. Venis multaj lokuloj, klubanoj, geamikoj, gastoj el Aŭstrio kaj Irlando kaj interesiĝis pri la grava evento pluraj ĵurnalistoj, raportistoj de gazetoj kaj Radio Göttingen. Anstataŭanta urbestro Wolfgang Weippert, kaj Peter Zilvar, gvidanto de la Esperanto-Centro mallonge

prelegis, poste ili kune senvaligis la novan murŝildon "Zamenhof-Platz". Poste sekvis la ŝtongravuraĵo, kiu surhavas la verdan Esperanto-stelon kaj la vortojn: "Zamenhof-placo". Ĝi estis enkonstruita en la placo-pavimon kaj estis inaŭgurita de s-ro Weippert kun Zsófia Kóródy, reprezentanto de la Esperanto-Centro kaj Michaela Stegmaier, prezidantino de GEJ.

Festaj momentoj

Partoprenis la ceremoniojn ankaŭ granda delegacio de la Art-Universitato el Poznań, Pollando, ĉar ilia ekspozicio de pentraĵoj estis malfermita en la sama tago en la Welf-kastelo. Kune ni havis bufedan tagmanĝon en la bela kastela restoracio, kie ni mallonge prezentis la rolon de Zamenhof, la kreadon de nova lingva komunikilo por interpopola kompreniĝo. En la posttagmeza programo sekvis vizito al la Esperanto-Centro por komuna kaffrinkado kaj manĝado de jubileaj tortoj.

Gazetara eĥo

Jam kelkajn semajnojn antaŭ la inaŭgura evento ni informis sufiĉe abunde (per gazetara dokumentujo) multajn gravajn gazetojn, radio- kaj televidkanalojn.

Raportisto de la Germana Gazetara

Agentejo (DPA) venis al Herzberg kaj fotis la Zamenhof-monumenton, dulingvajn vojmontrilojn, ktp. Ili dissendis la novaĵon al multaj germanaj kaj eksterlandaj gazetoj.

Gravaj retkanaloj, kiel "Focus-online", "Merkur online (Munkeno)" informis pri Herzberg kaj la Zamenhof-placo. Dank' al nia vasta publika agado gravaj germanaj gazetoj kiel Hamburger Abendblatt, Hessische Niedersächsische Allgemeine (HNA), Hannoversche Allgemeine Zeitung (HAZ) kaj multaj aliaj gazetoj aperigis pozitivajn artikolojn pri Esperanto kaj la Esperanto-urbo. Eĉ en fora Meksiko aperis informoj en la hispana lingvo en gazetoj kaj en retkanaloj. Laŭ niaj eltrovoj pli ol 20 gazetoj produktis informojn (plej ofte kun fotoj) pri nia unika evento, kiu postlasos novan ZEO-n en Herzberg en la Zamenhof-jaro. Tio estis bona koincido. Intertempe ankaŭ komercaj bildagentejoj uzas kaj vendas fotojn pri la Zamenhof-monumento kaj aliaj esperantlingvaj indikiloj en Herzberg.

Listo de la kolektitaj gazetartikoloj estas trovebla ĉe <http://esperanto-urbo.de> sub menupunkto Novaĵoj, kaj por fotoj bv. viziti la saman paĝaron (Aktuale, 2017-04-09)

Raportis Zsófia Kóródy

Grimprozujo 'D-ro Zamenhof' pompe floradas



Memorigoj pri la kreinto de nia lingvo Esperanto povas aperi en plej diversaj formoj. Unu el la plej belaj memorigiloj estas la grimprozujo „D-ro Zamenhof“. Ĝuste en la Zamenhof-jaro 2017 (kiam ankaŭ laŭ Unesko-rekomendo ni festas la 100-an mortodatevenon de la iniciatinto de Esperanto) ĝi pompe floradas en la Esperanto-ĝardeno de Interkultura Centro Herzberg (ICH) en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. Jam multaj vizitgrupoj kaj unuopuloj el dekoj da landoj ĝojis pri la florperiodoj de „nia rozo“ kaj faris multajn memorfotojn. Meze de junio 2017 ĝi denove pompe floradis.

Nun iom pri la historio: La fama bohemia rozbredisto d-ro Gustav Brada (1883 – 1937), kiu laboris kiel direktoro ĉe sukerfabrikoj en diversaj landoj, kiel Bulgario kaj Hungario, dum libertempaj periodoj sukcesis selekti elstaran rozvioletkoloran rozon el rozhibrido de la specio Wichurana. Por honorigi Zamenhof li donis al tiu fama rozo (intertempe bedaŭrinde forgesita rozspecio) la nomon de la aŭtoro de la lingvo Esperanto.

En la jaro 2010 ni hazarde trovis unu ofertan „D-ro Zamenhof-rozo“ ĉe konata

internacia aŭkcia domo.

Komprenoble estas konstantaj zorgoj pri la fama rozujo, ĉar tre multaj rozujoj malsanas pro multaj rozmalsanecoj. Ni devas regule forigi la flavajn foliojn kaj ŝprucadi kontraŭ diversaj rozmalsanoj, oni devas doni al la planto bonan teron, ktp. La penoj indas, por savi nian gravan „Esperanto-kulturvalorajon“. La „Zamenhof-rozo“ abunde kreskas (spite de fojfojaj malsanecoj) kaj grimpas sur speciala metala rozgrimp-arko. Tio fortigas kaj stabiligas la rozplanton.

Evidente ĝis nun nur unu tia - por esperantistoj aparte fama - rozekzemplero estas konata resp. alirebla. En la Esperanto-urbo kun jam konsiderinda unika Esperanto-infrastrukturo oni povas viziti (cetere senkoste) la Esperanto-ĝardenon, kie i.a. ankaŭ floradas la belaspekta „Rozo de la espero“ kaj la „Klematito Esperanto“, krom la sufiĉe konataj printempaj Esperantotulipoj.

Bedaŭrinde la etaj flavkoloraj „Esperanto-rozoj“ antaŭ kelkaj jaroj mortis post frostega vintro. Se iu hazarde scias, kie oni povas akiri ilin, bv. tuj kontakti nin. Pro tio ni jam nun dankas al vi.

Vivu Zamenhof en niaj koroj kaj la pompfloranta „D-ro Zamenhof-rozo“.

Raportis Zsófia Kóródy



Intervjuo kun prof. Li Weilun

Fraŭlino Li Lisha raportis, ke la 11-an de marto, post dumonata vizito al Usono profesoro Li Weilun reveninte al Pekino daŭrigas Esperanto-instruadon en du Esperanto-kursoj de la Pekina Lingva Universitato. La ĉefredaktoro de Tra la mondo tuj faris intervuon kun profesoro Li Weilun.

Kiam vi komencis lerni Esperanton?

Mi eklernis Esperanton en junio 1979. Kiam al mi havigis lernolibron de Esperanto, mi tralegis ĝin dum du horoj. Antaŭ tio mi jam lernis la lingvojn anglan, rusan, hispanan, francan kaj germanan. Pro tio preskaŭ ne ekzistis novaj vortoj por mi. Kelkajn nekonatajn vortojn mi povis kompreni en kuntekstoj.

Kie vi instruas Esperanton?

Aprile de 1980 mi komencis instrui Esperanton en Pekina Lingva kaj Kultura Universitato. Mi instruis Esperanton ne

nur en Ĉinio, sed ankaŭ en Meksikio, ne nur en Pekino, sed ankaŭ en aliaj urboj, ne nur en nia universitato, sed ankaŭ en aliaj universitatoj, ne nur en universitatoj, sed ankaŭ en mezlernejoj, elementaj lernejoj kaj infanĝardenoj. Inter miaj lernantoj la plej aĝa estas 93 jara kaj la malplej aĝa, 3 jara.

Kiujn lerno-librojn vi uzas?

Por instrui Esperanton mi kompilis kelkajn lernolibrojn: *Elementa Esperanto-Kurso* (2 volumoj, 1993), *Moderna Esperanto* (2 volumoj, 2007), *Moderna Esperanto por Infanoj* (4 volumoj, 2007 - 2010). Mi partoprenis en verkado de *Esperanto en Ĉinio dum 100 Jaroj* (1999) kaj *Konciza Historio de la ĉina Esperanto-Movado* (2004). La libroj estas legaĵoj por la lernantoj.

Kiel vi rolas en E-asocio?

En 1981 fondiĝis Pekina Esperanto-Asocio kaj mi estis elektita kiel komitatano,

kaj poste konstanta komitatano, vicprezidanto kaj prezidanto. Nun mi estas honora prezidanto de PEA kaj konstanta komitatano de Ĉina Esperanto-Ligo.

Kiom da landoj vi vizitis per Esperanto?

Mi ĉeestis en multaj universalaj kongresoj de Esperanto, aziaj kongresoj de Esperanto, konferencoj de ILEI, ĉinaj kongresoj de Esperanto, ktp. Mi vizitis 16 landojn kaj en multaj landoj mi estis entuziasme akceptita de lokaj esperantistoj. Pri tio mi skribis multajn artikolojn.

Kian planon vi havas por venonta tempo?

Kiam mi emeritiĝis en 1996, mi diris: "Por Esperanto mi neniam emeritiĝos." Nun mi aĝas 81 jarojn. Mi ankoraŭ instruas Esperanton. Mi laboros por Esperanto ĝis la lasta tago de mia vivo.

Interjuita de Red.



Mia vojaĝo al Usono (2)

■ Li Weilun (Ĉinio)

Mia nepino lernas ludi pianon en muzika lernejo. Ŝia instruistino nomiĝas Jenny. Ŝi venis el Hongkongo. Mi renkontis ŝin kelkfoje. Ni parolis kantonan dialekton. Ŝi havas pli ol dek gelemnantojn. Mia nepino iras al la muzika lernejo sabate. Ĉiufoje ili trejnas unu horon. Dank' al la helpo de Jenny, mia nepino progresis rapide kaj gajnis oran premion en iu konkurso. La 4-an de februaro okazis muzika prezentado en la lernejo. Ĉiuj gelemnantoj de Jenny laŭvice ludis pianon. Mi ĉeestis kaj diris al Jenny: "Mi venis ne nur por mia nepino, sed ankaŭ por vi." Ŝi ridegis.

La lernantoj de elementaj kaj mezaj lernejoj povas preni lerneajn aŭtobusojn por iri al lernejoj kaj reveni hejmen. La lernejaj aŭtobusoj estas senpagaj. Se iu malfruas, li aŭ ŝi devas peti helpon de sia patro aŭ patrino. Feliĉe ke la lernejoj ne estas malproksime. La lernejaj aŭtobusoj havas specialan rajton. Kiam ili haltas, ĉiuj aŭtomobiloj ambaŭflankaj, eĉ polica veturilo, devas halti kaj atendi ĝis la foriro de la lernejaj aŭtobusoj por garantii la sekurecon de la infanoj.

Mia nepo estas en la 8-a lernojaro. Li havas 10 studobjektojn: angla lingvo, hispana lingvo, matematiko, natura scienco, socia scienco, fizika eduko, komputilo, higieno, scioj pri vivo kaj teatro. Ĉiusemajne li havas 33 studhorojn. Ĉiu studhoru daŭras 50 minutojn. Ĉiutage la lernantoj devas legi 20 minutojn en la lernejo. La lecionoj de hispana lingvo estas interesaj. La lernantoj ne uzas lernolibrojn. Ili lernas per komputilo. La instruisto petas ilin fari diversajn aferojn. Ekzemple prepari hispanan aŭ latinamerikan manĝaĵon hejme, skribi menuon por hispana restoracio, desegni projekton de domo kaj hispane skribi nomojn de ĉiuj ĉambroj kaj mebloj...

Ekstere neĝeroj falis senĉese. La tero

estis kovrita de densa neĝo. La tuta mondo blankiĝis. Pro neĝo la lernejoj estis fermitaj. Miaj genevoj ne havis lecionon. Miaj filino kaj bofilo laboris hejme. Ĉivintre en Bostono ofte neĝis. Pro neĝo mi dufoje perdis ŝancon renkontiĝi kun lokaj esperantistoj. Dum neĝado estas danĝere konduki aŭtojn sur la stratoj. Neĝo alportas al ni freŝan aeron kaj riĉan rikolton. Tamen ĝi kaŭzas al ni multajn malfacilaĵojn. Mi kaj ŝatas kaj malŝatas neĝon.

Amerika futbalo estas la unua sporto en Usono. Usonanoj tre ŝatas ĝin. Mia bofilo rigardas ĉiujn matĉojn. La teamo de Bostono estas forta. Ĝi jam kvinfoje fariĝis ĉampiono. Ĉijare la lasta matĉo okazis inter la teamo de Bostono kaj la teamo de Atlanta. La konkurso fariĝis granda festo. Ĉeestis multaj gravuloj kaj famuloj. Komence la teamo de Atlanta ludis pli bone. La poentoj estis 28 kontraŭ 3 favore al Atlanta. Mia bofilo malesperis. Tamen poste la situacio subite ŝanĝiĝis. La teamo de Bostono ludis pli kaj pli bone kaj fine venkis la teamon de Atlanta. Mia bofilo eksaltis pro ĝojo kaj ripetis: "Nekredeble! Nekredeble!" Tiu nokto estis festo por la bostonanoj. En la televido la teamestro diris ĉine: "Ĉinaj amikoj, mi dankas vin pro via subteno. Feliĉan Printempan Feston!"

Vespere de la 14-a de februaro mi iris al restoracio por renkonti sinjoron David Wolff. Mi konatiĝis kun li en 2001. Tiam li estis prezidanto de Usona Esperanto-Ligo. Mi donis al li poemon: "Ni konatiĝis antaŭ dek ses jaroj. Nun sur la kapo kreskas blankaj haroj. En nia koro brilas verda stelo. Por Esperanto estas nia celo." Li tute konsentis. En la renkontiĝo ĉeestis ankaŭ studento. Mi rakontis al ili pri ĉina Esperanto-movado. Aŭdinte ke en mia Esperanto-kurso lernis pli ol 100 studentoj, ili miregis. Ilia grupeto konsistas el 5 personoj. David estas la respondeculo. Ili

renkontiĝas ĉiumarde por fari tradukan kaj konversacian ekzercojn.

La Bostona Regiona kaj Urbega Esperanto-Grupo renkontiĝas monate je la tria lundo. La 13-a de februaro devus esti ilia renkontiĝa tago, sed pro neĝo ili ŝanĝis la daton por ke mi povu ĉeesti. La 15-an mi sukcesis renkonti ilin. Mia bofilo veturigas min al la stacidomo. Mi prenis trajnon ĝis la urbocentro. Mia filino atendis min kaj akompanis min al la celloko per metroo, ĉar ŝi laboras en la urbocentro. Venis ses gejunuloj. Aŭdinte ke mi aĝas 81 jarojn, ili ne kredis. Unue ni babilis. Ili mem lernis Esperanton, uzante libron aŭ reton. Poste ni ludis Esperantajn kartojn. Mi ludis kun ili, sed mi ne tute komprenis. Fine ni fotiĝis. Kiam mi revenis hejmen, jam estis la 12-a nokte.

La 18-an de februaro nia tuta familio vojaĝis al Novjorko. Mi unuafoje vizitis ĝin en 2001. Ĝuste en tiu jaro, la 11-an de septembro, okazis mondmiriga terorisma atako en tiu urbo. Ĉifoje ni havis kvar celojn. Unue ni renkontiĝis kun la familioj de miaj genevoj. Mia nevo



laboras en Novjorko kaj mia nevino loĝas en Kanado. Ŝi speciale venis al Novjorko por la renkontiĝo. Due mia nepino ludis pianon en la Halo de Carnegie kaj ricevis oran premion. Trie miaj filino kaj bofilo iris al la konsulejo de Ĉinio por novigi siajn pasportojn. Kvare ni vizitis kelkajn muzeojn kaj vidindaĵojn.

Antaŭtagmeze de la 20-a ni tri generacioj kuniĝis en la parko, kie okazis internacia foiro en 1964. Venis mia nevo kaj lia filino. Lia edzino ne venis, ĉar ŝi estas okulistino kaj devis labori. Mi rigardis lian filinon kiel lian edzinon, ĉar ili tre similas unu al la alia kaj mi longe ne vidis ilin. Mia eraro kaŭzis ridegon al ĉiuj. Dum

tagmanĝo la okulistino venis. Mi rakontis al ŝi pri mia misvido kaj demandis kian malsanon havas miaj okuloj. Ŝi ridis kaj diris ke ŝi neniam renkontis tian pacienton. Ŝia respondo alifoje kaŭzis ridegon al ĉiuj. Kiel malsaĝa mi estis!

Novjorko estas la plej granda urbo de Usono. Ĝi estas financa kaj komerca centro. En ĝi troviĝas multaj domegoj. Sur la stratoj kuras miloj kaj miloj da aŭtomobiloj. La trafiko estas malbona. Tie loĝas multaj ĉinoj. Ekzistas du ĉinaj urbetoj. En Novjorko regas bruo kaj malordo. Ambaŭflanke de mallarĝaj stratoj parkas centoj da aŭtoj. La stratoj fariĝas pli mallarĝaj. Malfacile troveblas parkejoj. Foje

nia aŭto kontraŭregule parkis ĉe iu strato kaj estis punita je 100 dolaroj. Fore ni iris al magazeno, sed ni trovis neniun lokon por parki. Mia filino elautiĝis kaj eniris la magazinon, kaj mia bofilo kondukis la aŭton ĉirkaŭe ĝis eliro de mia filino. Estas malfacile trovi necesejojn. Foje mi volis iri al necesejo kaj eniris kafejon. Mi demandis: "Ĉu mi povus uzi vian necesejon?" La respondo estis: "Se vi aĉetos iun trinkaĵon, vi rajtos uzi ĝin." Mi aĉetis glason da kafo kaj pagis du dolarojn. Tamen mi ne trinkis ĝin, ĉar mi timis refojan urinadon. Iuj lokoj estas malpuraj, eĉ danĝeraj. La koloro de la urbo estas nigra, griza kaj bruna. Mi ne ŝatas Novjorkon (fino).

Speciala signifo de iuj kunmetitaj vortoj

La vortogrupo "la unuan fojon" kaj la kunmetita vorto "unuafoje" estas samsignifaj. Tamen ne ĉiuj kunmetitaj vortoj egalas al la vortogrupoj. Ekzemple, "nova jaro" kaj "novjaro" ne estas samaj. "Nova jaro" estas venonta jaro. Ĝi komenciĝas en la 1-a tago de januaro kaj finiĝas en la lasta tago de decembro. "Novjaro" estas festo. Ni povas diri: "Feliĉan Novjaron!" Ni ankaŭ povas deziri al iu grandajn sukcesojn en la nova jaro. Same kiel "cent jaroj" kaj "jarcento", "dek tagoj" kaj "tagdeko"... "Jarcento" havas cent jarojn, sed "cent jaroj" ne estas "jarcento". Cent jaroj povas

komenciĝi de iu ajn jaro. Jarcento estas numerita periodo de cent jaroj, kalkulita de la naskojaro de Jesuo Kristo. "Tagdeko" havas dek tagojn, sed dek tagoj ne estas "tagdeko". "Tagdeko" estas unu el la tri partoj de la monato. Ni povas diri: la unua tagdeko, la dua tagdeko kaj la tria tagdeko. Alia ekzemplo: "Nova edzo aŭ edzino" kaj "novedzo aŭ novedzino" estas malsamaj. "Nova edzo aŭ edzino" estas alia edzo aŭ edzino. "Novedzo aŭ novedzino" estas nomataj dum geedziĝo. Alia ekzemplo: "ĉefa urbo" kaj "ĉefurbo" estas diferencaj. Ĉefaj urboj povas esti multaj, sed ĉefurbo

estas nur unu. Same kiel "ĉefaj verkoj" kaj "ĉefverko(j)". Ĉefaj verkoj povas esti multaj, sed ĉefverko(j) estas nur unu aŭ kelkaj. Ĝi aŭ ili estas la plej gravaj de iu verkisto. "Kapra barbo" estas barbo de kapro, sed "kaprobarbo" estas barbo de iu viro, ĉar ĝi similas al barbo de kapro. "Akvovalo" estas kaskado, sed "akvo falas" signifas, ke iu ajn akvo falas de alte, kvankam ĝi estas malgranda. "Akvomelono" estas frukto. "Sunfloro" estas floro. "Terpomo" estas manĝaĵo. Ili havas specialan signifon. Ni ne povas diri "akva melono", "suna floro" aŭ "tera pomo".

Li Weilun



Komenciĝas la E-kursoj en Pekina Lingva Universitato



La 11-an de marto, post dumonata vizito al Usono s-ro Li Weilun reveninte al Pekino daŭrigas Esperanto-instruadon en du Esperanto-kursoj de la Pekina Lingva Universitato, el kiu unu estas elementa kurso por komencantoj, kaj alia estas meznivela kurso por progresantoj. En la kursoj partoprenis pli ol 20 personoj, el kiuj la plej juna estas nur 4 jaraĝa, kaj

la plej maljunaj aĝas sepdek jarojn. Ĉiuj partoprenantoj serioze lernis ĝis la lasta minuto de la kurso, kaj aplaŭdis pro interesa instruado post kvar hora instruado de la 8-a ĝis la 12-a horo antaŭtagmeze. Por la kursoj li uzas la lernolibron "Moderna Esperanto". La kursoj okazas 2 lernhorojn ĉiusabate, kaj daŭros ĝis fino de la semestro.

Raportis Lisha



Stafeto por mobilizi ĉinojn aliĝi al la 102-a UK



La 1-an de januaro 2017 Ĉielismo Wang Tianyi, Spado Qi Jian kaj aliaj aktivaj esperantistoj en la monaĥejo Shipengdong situanta en montaro for de la urbo Taiyuan, kune kun la majstro, Miaohui, konata Esperanto-parolanta monaĥo, okazigis Esperanto-pachenon por la nova jaro 2017, kaj lanĉis stafeton por mobilizi ĉinojn aliĝi al la 102-a UK. Laŭ la plano diverslokaj

esperantistoj poŝte cirkuligas du larĝajn standardojn kun skribo "Ĉina Stafeto por 102-a Universala Kongreso en Seulo" de urbo al urbo. Akceptinte la standardojn oni subskribis siajn nomojn sur la standardoj por esprimi subtenon al la UK. Dum la malvarma vintro la stafetoj cirkulis en la suda Ĉinio kaj poste iris al norda Ĉinio. Dum la cirkulado kiam la poŝtaĵoj alvenis,

lokaj esperantistoj renkontiĝis por akcepti kaj subskribi sur la longaj verdaj standardoj. Ĝis fino de junio, pli ol 800 esperantistoj en 25 urboj subskribis por subteni la 102-an UK-n. Post la cirkulado oni kunportos la subskribitajn standardojn al la 102-a UK en Seulo.

Raportis Wei Shan kaj Chielismo Wang Tianyi



Tekunsido de Esperanto organizita de PEA



Je la 9-a kaj duono antaŭtagmeze de la 25-a en Marto komenciĝis la tekunsido de Esperanto, organizita de PEA, en la lernoĉambro 106 de la Instrua Domego 1 en Pekina Lingva Universitato. S-ro Fortego prezentis la kunsidon, ĝin ĉeestis pli ol 20 asocioj, plejparte estis kursanoj elementaj kaj mezgradaj. Unue Fortego prezentis la enhavon de la kunsido en Esperanto, dirante: "Kiel konate, nia estimata instruisto Li Weilun vojaĝis al Urbo Boston en Usono dum vintraj ferioj, ĉar lia filino kun siaj familianoj loĝas en tiu urbo. Hodiaŭ ni petas instruiston Li prelegi pri sia vojaĝo al Usono, kaj ni petas niajn kursaninojn Man

Lixia kaj Shi Linjuan interpreti por ni."

Sekve instruisto Li komencis la prelegon. Li parolis Esperante pri siaj travivaĵoj en Boston, Atlanta, Orlando, Novjorko prezentante fotojn, kiujn li fotis en super menciitaj lokoj. Estas ĝojinde, ke li renkontiĝis kun lokaj esperantistoj, kun kiuj li konatiĝis antaŭ 15 jaroj.

Niaj interpretistoj bone tradukis la prelegon. Post la prelego iuj faris demandojn al preleganto kaj instruisto Li respondis al ili kun plezuro.

Raportis Fortego



PEA kunvenis omaĝe al la centjariĝo de la forpaso de Zamenhof



En la 15-a de aprilo okazis speciala kunveno de Pekina Esperanto-Asocio omaĝe al la centjariĝo de la forpaso de Zamenhof, iniciatinto de la internacia lingvo Esperanto. La kunveno okazis en Pekina Lingva kaj Kultura Universitato, kie jam de multaj jaroj regule okazis Esperanto-kursoj kaj aliaj aktivaĵoj organizitaj de la Pekina Esperanto-Asocio.

Ĉi-foja kunveno ne okazis en ĉambro, sed en unu el la belaj ĝardenoj de la universitato, kiuj dum printempo pleniĝis de floroj kaj verdo. Eblis aŭdi la kantadon de birdoj kaj ĝui la trankviligan etoson. Multaj vizitantoj iris al la universitato dum semajnfinoj por pasigi la tagon, inter ili gepatroj kun infanoj kaj fotemuloj kiuj profitis la printempon por foti la belajn peoniojn en la universitato.

Esperantistoj renkontiĝis en la ĝardeno je la naŭa matene kaj pendigis ĉe kiosko la flagon de Esperanto kaj la nomon de la evento en la ĉina lingvo por kapti la atenton

de scivolemaj preterpasantoj, kiuj dum iom da tempo restis ĉe ni kaj informiĝis pri la lingvo. Multaj pekinaj esperantistoj ne povis ĉeesti, sed inter la ĉeestantoj estis homoj junaj kaj maljunaj, fluparolantoj kaj komercantoj, kaj la etoso estis tre agrabla.

La kunsidon gvidis samideano Fortego, kiu salutis la ĉeestantojn kaj invitis la parolantojn paroli en tiu soleno omaĝe al Zamenhof. Unue parolis D-ro Li Weilun, veterana esperantisto kaj profesoro de Pekina Lingva kaj Kultura Universitato, kiu koncize prezentis la vivon de Zamenhof kaj poste parolis pri la reguloj de Esperanto, ofte komparante ĝin kun aliaj lingvoj.

La sekva parolanto estis Liu Junfang, kiu rakontis la historion de Esperanto-redakcio de Ĉina Radio Internacia, fondita de li mem en decembro 1964.

Poste Rafael Henrique Zerbetto, el Brazilo, kiu vivas en Pekino kaj laboras en la esperanta redakcio de *El Popola Ĉinio*, laŭtleĝis parton de la parolado de

Zamenhof dum la solena malfermo de la unua Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en 1905 en Francio, kaj Ĝoja, ĵurnalisto de Ĉina Radio Internacia, laŭtleĝis la saman tekston en la ĉina lingvo.

Choi Manwon, esperantisto el Korea Respubliko, kiu vivas en Pekino kaj laboras kiel raportisto de *El Popola Ĉinio*, parolis pri la lernado de Esperanto, substrekante, ke malgraŭ tio, ke Esperanto estas pli facile lernebla ol etnaj lingvoj, oni devas diligente studi por kapabli flue paroli ĝin, kaj konsilis al lernantoj ĉiutage legi tekston en Esperanto kaj korespondi kun aliaj homoj en ĝi.

La lasta parolanto estis samideanino Lin Lisha, kiu rakontis pri sia vojaĝo al Pollando, precipe al Bjalistoko, kie naskiĝis Zamenhof.

Post la fino de la kunsido samideanoj agrable babilis dum iom da tempo kaj poste adiaŭiĝis.

Raportis Fortego





Inaŭguriĝis Shandong-a Esperanto-Klubo en la Zaozhuang-a Universitato

En la 9-a de aprilo, en la Zaozhuang-a Universitato okazis la inaŭgura ceremonio de la Shandong-a Esperanto-Klubo. El ĝi ĉeestis s-ro Sun Mingxiao, vicĝenerala sekretario de ĈEL kaj respondeculo de la Esperanto-Muzeo en la universitato, d-ro Sasaki Teruhiro el Japanio, eksa prezidanto de KAEM kaj profesoro de

la universitato, d-ro Bak Giwan el la Korea Respubliko, vicprezidanto de la klubo kaj profesoro de la universitato, kaj kelkaj junaj klubanoj.

La Shandong-a Esperanto-Klubo fondiĝis en decembro 2016 kaj nun havas 54 membrojn kiel nova organizo de Esperanto en Shandong-

provinco. La klubo apartenas al la Esperanto-muzeo de la universitato. S-ro Sun Mingxiao, la respondeculo de la muzeo, estas ĝia prezidanto.

Raportis Sun Mingxiao





Ekspozicio pri Zamenhof kaj pola kulturo okazos en Zaozhuang

La 6-an de marto 2017, s-inoj Ewa Szkdelska kaj Huang Lin, kulturaj oficistinoj de la pola ambasadorejo en Ĉinio vizitis la Esperanto-Muzeon en la Zaozhuang-a Universitato en orienta Ĉinio akompanitaj de s-roj Wang Ruixiang, vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario de ĈEL kaj Jiang Limin, asistanta ĝenerala

sekretario de ĈEL. S-roj Hu Xiaolin, ĉefa estro de la universitato kaj vicprezidanto de ĈEL kaj Cao Shengqiang, rektoro de la universitato kaj konstanta komitatano de ĈEL akompanis la vizitintojn.

Post vizito oni okazigis kunsidon por diskuti preparon de ekspozicio por omaĝi al d-ro Zamenhof, kiu forpasis

antaŭ 100 jaroj. Ili decidis, ke en septembro ili kunlabore okazigos ekspozicion pri Zamenhof kaj pola kulturo en la antikva urbeto Tai'erzhuang en Zaozhuang, kiu detruigis en la dua mondmilito kaj rekonstruiĝis kiel la urbo Varsovio.

Raportis Sun Mingxiao



XEA komencis kunlabori kun loka entrepreno

Je la 14-a horo en la 5-a de marto, okazis ceremonio por lanĉi kunlaboron inter la Xinxiang-a Esperanto-Asocio (XEA) kaj la ĉen-fridiga kompanio Dengke en la "Gardena Tetrinkejo", fondita de la Esperanto-asocio. Dek du personoj, inkluzive de estroj de la kompanio kaj prezidanto de la asocio Liu Jiahe, ĉeestis en la ceremonio. Ambaŭ flankoj subskribis la dokumentojn pri kunlaboro kaj interŝanĝis ilin.

Unu el la roloj atendataj de Esperanto estas, ke ĝi funkcii kiel ilo de lingvaj interŝanĝoj en la internacia komunumo. La asocio volas, paralele al la disvastigo de Esperanto, fari ion por helpi la kreskadon de loka komercado. La produktaĵoj de la kompanio Dengke ĝuste taŭgas por la plano de la asocio. Antaŭe, la asocio sukcese faris similan kunlaboron. Do, la du flankoj klopodos glate kombini komercon kaj Esperanton kaj akiri "kungajnon".

Lastatempe la asocio ankaŭ okazigis plivastigitan konsilian kunvenon. Dek kelkaj partoprenantoj diskutis pri la Esperanto-aranĝoj en la kuranta jaro.

Raportis Liu Jiahe



Festo de la 32-jara Tianjin-a Esperanto-Asocio



La 9-an de marto antaŭ 32 jaroj fondiĝis la Tianjin-a Esperanto-Asocio kaj tiu tago fariĝas tradicia jubilea festo de Tianjin-aj esperantistoj. En la 12-a de marto ĉijare Tianjin-aj samideanoj kolektiĝis por celebri la naskiĝdaton de la asocio kaj memori tiun ĉi tagon. Ĉirkaŭ 9 membroj de la asocio ĉeestis la festadon, inter ili kelkaj estas sepdekjaraj veteranaj esperantistoj, ili estas la fondintoj de la Asocio. Dum la festo la membroj de la asocio interkonsentis ĉiutage legi verkojn de Zamenhofo laŭ la alvoko de UEA por la Zamenhofjaro, kaj vaste kaj pli libere kontakti kun diverslandaj amikoj.

Raportis Lisha



La 4-a Irana Esperanto-Kongreso en Tehrano

En la 5-a de Majo matene je la 9-a horo komenciĝis la 4-a Irana Esperanto-kongreso meze de Tehrano en bela parko en printempa etoso kun verdaj arboj kaj branĉoj plenplenaj de folioj.

Laŭ la listo enskribiĝis 43 personoj inkluzive unu el Sirio, partoprenis ĉirkaŭ 30 en la kongreso.

Ĉe la komenco de la kongreso multaj personoj prezentis sian salut-mesaĝon ĉu proksimaj (de provincoj) ĉu malproksimaj (el Tajvano) pere de Skype. Estis ankaŭ salut-mesaĝo de honoraj personoj ekz. Renato Corsetti ktp.

La unua preleganto estis D-ro Sayadpour kiu parolis pri sia vojaĝo al Ugando.

Sekvis la programo kun prelego de S-ro Fekri kiu allogis la partoprenantojn per amuzaj rakontoj kaj oni devis diveni la finan parton de la rakontoj.

D-ro Sufi prelegis pri lingvaj aspektoj de Esperanto: "kio estas pli bona lingvo?".

D-rino Karimi pri "Virinoj en Irana Labor-merkato". Ĝi temis pri ekonomia situacio de la nunaj iranaj virinoj. Statistikoj en la prelego interesis la partoprenantojn.

S-ino inĝeniero Solat prelegis pri MK-10 Mez-orienta Kunveno).

La posta preleganto, S-ro Saedi, kiu loĝas en Ĉinio, raportis pri siaj spertoj akiritaj dum multaj jaroj en tiu lando.

Interesa parto de la kongreso estis aŭkcio kiu la unuan fojon okazis en nia

kongreso por helpi kaj subteni Iranan Esperanto-Asocion (IREA).

Poste S-ro inĝiniero Mamduhi prelegis pri Naciaj lingvoj kaj Esperanto.

Fine d-ro Sufi prezentis raporton pri agadoj de junuloj en IREJO (Irana Esperanta Junulara Organizo) kiu inkluzivis tradukon de filmoj kaj muzikoj, kaj la partoprenantoj aŭdis tradician muzikon kaj vidis ties dancon.

Ĉe la fino de la kongreso je la 17-a horo oni havis komunan foton por ke ĝi restu kiel alia memorindaĵo de la Irana Esperanto-movado.

Raportis *Surush Mohammad-zadeh*

Pentristo Liu Derui kaj liaj pentraĵoj pri tempo kaj vivo

■ Zhuang Huaiqung (Ĉinio)

S-ro Liu Derui, pentristo en gubernio Huixiao, Anhui Ĉinio, naskita en 1949, ekde 1968 servis kiel konstrua soldato, polica soldato kaj poste kolonelo. En 1995 li enposteniĝis kiel altranga ŝtata oficisto de registaro de Pekino, kaj emeritiĝis en 2004. Li ŝatas luktosporton ekde infanaĝo, interesiĝas pri ĉina historio, konfuceismo, budhismo kaj taoismo. En luktosporta ekzerco li ekakiris inspiron pentri senĉese. Dum pasitaj 20 jaroj li senintence pentris nur laŭ hazarde aperintaj sentoj, aŭdoj aŭ inspiroj, ĉiam sen antaŭplano kaj projekto por la pentrado. La bildoj pentritaj de li, estas ŝajne kore elŝprucitaj vivsignoj kaj inspiroj. Ĉiu el liaj ĉirkaŭ dekmil pentraĵoj havas apartan stilon, tute malsimilan de tradicia pentra stilo. Multaj el la pentraĵoj estas aĉetitaj de pentraĵkolektantoj aŭ aperigitaj en multaj konataj ĵurnaloj kaj retpaĝoj.

Tra liaj plumoj, el drakoj kaj feniksoj flugantaj sur dekmil pentraĵoj videblas kaj mikra kaj makra mondoj. De iu ajn flanko de liaj pentraĵoj, vertikale, horizontale, klininte, inverse eĉ turnante, videblas nekalkuleblaj



La pentraĵo de s-ro Li Denrui

malsamaj kompletaj bildoj de drakoj kaj feniksoj kun dekmil aspektoj kaj pozoj, en montaroj, arbaroj, marfundoj, anguloj ie, eĉ steloj kaj kosmo, en du, tri, kvar kaj multdimensioj. Ili estas nomumitaj koraj, kosmaj, kosm-belartaj aŭ kosm-

ekologiaj pentraĵoj.

La pentristo absolute ne kopie ripetis la stilojn kaj metodojn de aliaj pentristoj de ĉinaj ĝis eksterlandaj, de aktivaj ĝis modernaj. La pentra arto estas ege malfacile instruebla kaj heredebila.

Akrilacia polimera akvimuna farbo LEAC por protekti akvotralikon

Li Jiaquan (Ĉinio)

En AMO-seminario februare 2016 en Nepalo mi sukcese riparis akvo-tralikintan lokon de la domo de Nepala Esperanto-Asocio per la farbo LEAC produktita de nia kompanio LEAC, Ĉinio. En la IKEF-kunsido dum la 101-a UK mi prezentis la akrilacian polimeran akvimunan farbon LEAC, kiu bonefike protektas akvotralikon. Post la UK mi riparis kelkajn familiajn konstruaĵojn akvo-tralikintajn per ĝi en la urbo Nitra. Dum mia prezentado en Nitra ne malmultaj esperantistoj ege interesigis pri la farbo LEAC. Nun mi detale prezentas ĝin sube.

La akrilacia polimera akvimuna farbo LEAC investita en ĉina registaro, estis elesplorita de ĉina armea fabriko en 1980-jaroj, kaj poste transiris al alta teknika produkto en populara konstruado. La produkto estas aŭolvebla aŭ ŝmirebla kun diversaj karakterizaĵoj:

1. Alta tirforto. La tirforto de ties ŝmira tavolo dika je 2 mm povas atingi 2292 N/50 mm-n, 2.8-oble pli alta ol la ĝenerala akvimuna farbo SBS, kies tirforto estas nur 800 N/50 mm.

2. Alta kontraŭfendiĝo. La kontraŭfendiĝa longeco povas atingi 8 mm-n, t.e., la farbo oni povas tiri la ŝmiritan tavolon ĝis 8 mm sen rompiĝo.

3. Fleksebleco ĝis sub - 40 °C. La farbo reestas fleksebla sub - 40 °C, kaj uzebla sub -50 °C sen kovrado.

4. Kontraŭvarmeo ĝis 240 °C, sen

fluado, gutado kaj glatiĝo dum 0.5 horoj.

5. Anti-akveco. La farbŝmiraĵo sen nenia kovro-tavolo povas longe resti en akvo sen ŝanĝiĝo.

6. Senmalnoviĝo kontraŭ ultraviolaj (transviolaj) radioj. Testado dum 1000 horoj sub ultraviolaj radioj montris ke la tirforteco kaj la fleksebleco ne malfortiĝis, sed pliiĝis.

7. Forta kungluiĝo. En tira testado oni sukcese rompis kubojn el cemento de C30 da forteco, kunligitajn per la farbo, sen nenia detruo de la farba kungluaĵo. Tio signifas ke la forteco de la farbo estas pli alta ol la forta cemento C30.

8. Kunligiĝo al plurspecaj materialoj. La farbo estas uzebla sur surfacoj de diversaj cementaj kaj ne-cementaj materialoj.

9. Antiputriĝo. La farbo estas pli alte antiputra en likva medio, kaj pli forte antiputrema en gasa medio. Ĝi estas uzebla en akvimuna kaj antiputrema konstruaĵo. Oni povas ornamati aŭ malputrigi ankaŭ ŝtalan konstruaĵon per ĝi.

10. Traktebleco en malbonaj kondiĉoj. Oni povas konstrui per ĝi en malvarma kondiĉo ĝis -10 °C, aŭ sur humida eĉ inundita surfacoj post akva viŝado.

11. Bona akvimuno sur dorsa flanko. Per ĝi oni povas ripari kaj konstrui surfacojn de subteraj truoj, kanaloj kaj diversaj konstruaĵoj por imunigi akvon.

12. Higieno kaj mediprotekto. La farbo estas aprobita en ĉina manĝaĵa higiena ekzameno pri manĝaĵo-produkta medio.



S-ro Li Jiaquan, alta inĝenero pri konstruado, reprezentanto de la kompanio LEAC

Oni povas ŝmiri la farbon rekte sur muron de akvujo de trinkebla akvo por imuni akvon, sen alia protekta tavolo. La normo difinita de la Ŝtato diras, ke la farbo LAEC estas rekte uzebla en trink-akva akvujo. La produkto estas aŭtentikigita de la Ĉina Mediprotekta Ministerio kiel verda mediprotektaĵo kun la 10 signaj cirkloj. La volatiliga/vaporiĝa organika kombinaĵo (VOK) estas 8~10-oble pli malalta ol la normo difinita de la Ŝtato (GB50325-2010).

13. Vasta utileco. Ĝi taŭgas en la akvimuna konstruado en ĝenerala konstruaĵo, surfaco de domo, akvujo, necesejo, kuirejo, koridoro, planko, muro, ponto, fervojo, trafika kanalo, akva kanalo, traktejo de malpura akvo, koridoro de diversaj subteraj tuboj, ktp.

14. Kontraŭ fajro. La farbo LEAC estas sekura en transportado, konservado, konstruado, ktp. sen brula danĝero. La farbo nekovrita LEAC estas kontraŭ-membrulebla, kaj ne-brul-helpa. Ĝi brulas nur ĉe distanco "0" kun fajra semo.

15. Per la metodo invers-glui sur muron kun anticipe-ŝmirita farba tavolo, oni povas facile konstrui akvimunan tavolon sur muron de subteraj konstruaĵoj.

16. Per la metodo, pistolfarbi tra reta kovrilo, kvar laborantoj povas konstrui 3000 m² da farba akvimuna surfaco dum 8 horoj.



S-ro Li Jiaquan (la 1-a dekstre) kun geamikoj en la 101-a UK

La kompanio LEAC serĉas kunlaborantojn

Kontakto: s-ro Li Jiaquan, reprezentanto de la kompanio LEAC, 2908096823@qq.com, poŝtelefono: +86-18971085288



S-ro Li Jiaquan riparas akvotralikan tegmenton per la farbo LEAC en Nitra, Slovakio, dum la 101-a UK.



Laboristo konstruas akvofluejon per la farbo LAEC



Konstruado de ŝtala tegmento per la farbo LEAC



Laboristoj konstruas la fundamenton de konstruaĵo por bari akvan tralikon per la farbo LEAC



La ŝtalo estas rompita, tamen la farba tavolo daŭre bone funkcias


Pentraĵoj de Liu Derui



Vintrodormado



Kunulo de tempo



Du dimensioj de tempo



Pejzaĝo de la granda kosmo